

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2013

Kara Leganto, meze de Oktobro en la bela okcidentukraina urbeto Kolomeo okazis scienca E-konferenco, dediĉita al 100-jara datreveno de E-revuo "Ukraina Stelo", fondita de Oresto Kuzjma. De nia E-societo, en fora Ĉekarpatio (apudas la Karpata montaro) partoprenis du membroj: prez. D-ro L. Kordylewski kaj x-prez. V. Pajuk (pli simple – Viktoro-redaktoro). Materialoj por ĉi numero estis preskaŭ pretaj meze de Novembro 2013, sed la postaj okazintaĵoj en la glorplena Ukrainio, popolo de kiu ne akceptis rifuzon de t. n. prez. JanukOvoĉ (Januk-Legomo) subskribi asocian interkonsenton (ne membrecon!) kun EU igis min (redaktoron) demeti multon en tirkeston. Nun, meze de la jaro 2014, kiam pacemaj protestoj en ĉefurbo Kijivo transformiĝis en militon kun kremla agresisto pUTINO, mi decidis redoni mian ĵurnalistan ŝuldon al multaj legantoj de "Saluton!". Bonvolu pardoni pro la prokrasto, sed akcepti komprenante. Sinceran dankon!

–Viktoro-redakcio

E-Konferenco en Kolomeo de D-ro L. Kordylewski, Prez.

Kolomyia – tiu nomo ĝis nun por mi sonis nure kvazaŭ fabela nomo de iu nereala loko, kiun mi sciis ekde mia infaneco de miaj familanoj. Antaŭ la 2a mondmilito ili loĝis en tiu belega regiono de Galicio kaj poste rakontadis al mi iliajn memorojn. Des pli volonte mi akceptis la sugeston de nia Viktoro-redaktoro, ke mi vojaĝu al Ukrainio por partopreni la E-konferencon en Kolomeo.

Sperti esperantan etoson kun la ukrainaj esperantistoj estis por mi granda plezuro. Pli ol kvardek delegitoj venis de diversaj regionoj de Ukrainio, kiel Kijivo, Odeso, Lucko, Lvivo, Ternopilo k.a. Ni komencis per malkovro de la memortabulo sur la domo, en kiu loĝis kaj E-aktivis fama ukraina esperantisto Oresto Kuzjma (1893-1968). Nuntempe en lia domo troviĝas privata muzeo, enhavanta ne nur liajn familiajn antikvajn memoraĵojn, sed ankaŭ multajn interesajn esperantaĵojn de la pasinteco. Unuafoje mi vidis (kaj eĉ povis trafoliumi) la originalon de la unua zamenhofa lernolibro de Esperanto – datita 1887! Vera trezoro. Eldonita en Varsovio en la rusa lingvo. Kiom da ekzempleroj ankoraŭ ekzistas aliloke?

Kiel fotoamatoro mi ĝojis vidi la originalan fotoaparaton de s-ro Kuzjma, simila al tiu, kiun uzadis mia onklo en la komenco de la 20a jarcento. Estis por mi



plezuro ekscii, ke s-ano Kuzjma estis biologo, same kiel mi. Ni metis florojn sur lian tombon en la kolomea tombejo.

Sekvis kunsidoj en la loka muzeo. La konferenco ĝuis subtenon de la urbestro kaj episkopo, kiuj festparoladis. La fakaj prelegoj temis ĉefe pri la historio de la rolo de la urbo Kolomeo en la monda kaj ukraina E-movado. Kun varma aplaŭdo de la partoprenantaro Viktoro-redaktoro prezentis la noveldonitan antologion de la

tradukoj de originalaj esperantaj verkoj tradukitaj en la ukrainan lingvon. Ĝi estas grava sekvinda ekzemplo por aliaj diverslingvaj nacioj, ke nia esperanta literaturo estu konata ankaŭ de neesperantistoj.

La kolomea telvido produktis bonegan ukrainlingvan programon pri Esperanto kaj la E-konferenco: <http://tinyurl.com/lod7ydr> ~ Oni interviuis min, kiel unusolan fremdnacian partoprenanton. Mi havis la okazon paroli esperantlingve, sed ankaŭ utiligi mian konon de la rusa lingvo, kiu estas nevolonte uzata en Okcidenta Ukrainio. Ho ve, mi – poldevena usonano, devis paroli al la ukrainoj en la rusa! Demonstrate la absurdecon de tiu situacio, mi emfazis nian bezonon uzi la neŭtralan Internacian Lingvon. La televida redaktorino Mariana Mackeva tiel entusiasmigis, ke eĉ promesis viziti nin en Ŝikago.

“Ukraina Stelo” – 100-Jara

Komenco de la XX jc. estis tempo de la progreso de la IL Esperanto, plejparte en Eŭropo, sed ankaŭ en Nordameriko, Azio. En 1905 al la plej unua UK de Esperanto en la franca urbeto Bulonj-sur-Mer kunvenis 688 adeptoj de la E-o el 20 ŝtatoj. En tiu tempo Okcidenta Ukrainio apartenas al Aŭstro-Hungara Imperio, kie loĝis multaj etnaj grupoj. Nome tie estis eldonita la plej unua E-lernolibro por ukrainoj (M. Jurkiv, Ternopilo, 1907), same tie aperis la unua E-societo de ukrainlingvanoj (Lvivo, 1912). En la sama, 1912 jaro en Krakovo okazis 12-a UK,




kiun partoprenis delegacio de ukrainaj E-istoj, kiu fakte ne havis la propran ŝtaton. Inter ili estis juna Oresto Kuzjma, kiu salutis partoprenintojn de la UK vestinta en ukraina popola kostjumo (ĝis nun ukrainaj E-istoj por la inaŭgura ceremonio surmetas broditajn ĉemizojn). 20-jara O. Kuzjma, konatiĝinte dum la UK kun la Majstro, decidis disvastigi la ILon inter ukrainoj kaj komence de la 1913 en Kolomeo aperis revuo "Ukraina Stelo" (vd la foton de O. Kuzjma sur la fono de la plej la n-ro).

Do, Oresto Kuzjma (1892-1968) – ukraino, finis gimnazion en Kolomeo, kie instruis klasikajn lingvojn lia patro Leontij, Komercan altrejnejon (Vieno), juran kaj filozofian fakultaton de la Viena Universitato. Militis dum la I-a MM, post la II-a MM fare de sovetia potenco estis ekzilita en Siberion. En 1956 revenis en Kolomeon, kie mortis en 1968.

La eldonkvanto de la revuo estis pr. 300 ekzempleroj, kun la revuo kunlaboris ankaŭ ne E-istoj, kiel pentristo-grafikisto H. Kolcunjak, verkistoj, financistoj, deputitoj de la Aŭstra Parlamento. En la revuo aperis ne nur pri-Esperantaj artikoloj, multaj paĝoj estis dediĉitaj al historio, etnologio, literaturo, geografio de Ukrainio. La aperigo estis rompita per la IMM (1914), sed poste renovigita. La lasta konata n-ro estas, probable, 2, 1923.

La sekvanta re-viviĝo de la eldono okazis post pr. Sepdekjaro: en 1989, ankoraŭ dum sovetia tempo estis fondita la Ukraina Esperanto Asocio, kiu en 1990 eldonis (ne tro altkvalitan) "Ukrainian Esperantiston". Dum januaraj frostoj de 1991 en urbeto Pustomito apud miliona Lvivo kolektiĝis aro de samideanoj, kiuj decidis renaski la "Ukrainan Stelon", inter ili: ukraina filologo, poeto, redaktoro V. Pacjurko (Putomito), pentristoj, fratoj Lukaŝidoj (Lucko), financa motoro, fama foto-artisto Vasil Stanoviĉ (Drohobiĉo), ĵurnalisto, ĝis-osta E-isto Viktoro Jaskovec (Ivano-Frankivsko) kaj tiama direktoro de la renovigita revuo, nuna redaktoro de "Saluton!" (Ternopil-Ŝikago) Araneo. Ni preparis 11 n-rojn, eldonis nur dum unu jaro dekon da ili (vd foton), unu estis perdita en kijiva presejo. Interesaj faktoj: post la presado en tipografio (o)ni algluis bildon de tiam malpermesata blazono de Ukrainio, estis aperigitaj E-tradukoj de tiam malpermesata himno (oficiala nun) de Ukrainio, de multaj neagnoskitaj (tiam) ukrainaj verkistoj. Tiutempa "US" estis bazo por dume ne eldonita "Ukraina Antologio", por la "Verda Antologio" (Esperanta antologio en la ukraina lingvo, la 1-a poezia volumo "ekvidis mondon" ĝuste en Kolomeo, Oktobro, 2013).

Moderna "Ukraina Stelo" aperas kiel jara almanako de 1994-6, 2009 – ĝis nun (vd foton de kovrilo 2011).



–Araneo

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

15an de Decembro – Zamenhofa
Tago kaj Bankedo 2013

Esperanta Literaturo (2)



Daŭrigante "kurson" de la E-poezio, hodiaŭ je via atento estas proponata poemo **La Pluva Tago**, verkita de la "Patro de E-poezio" Antoni Grabowski (1857-1921) – pola ĥemiisto, poligloto (posedas pli ol 30 lingvojn), E-isto de 1887. Interesa estas ankaŭ la fakto, ke inter la aŭtoro kaj

la Majstro okazis la plej unua en la mondo Esperanra konversacio. Do, ĝuu **La Pluva Tago!**



La tago malvarma, malgaja, sensuna;
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Vinujo je l' muro putranta sin tenas,
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,
Kaj la tago – malvarma, sensuna.

Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna:
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,
Sed falas en vento esperoj velkintaj,
Kaj la tagoj – malvarmaj, sensunaj.

Ekhaltu, ho, koro malgaja, ne plendu!
Post nuboj la suno radias – atendu!
Ne sola vi tiel kun sorto hatalas,
En la vivon de ĉiu la pluvo ja falas,
Kelkaj tagoj – malvarmaj, sensunaj.